



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 8
1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid 1968

Al la kongreso aliĝis entute 1770 personoj el 38 landoj, do sufiĉe granda partoprenado: inter ili 17 el Norvegujo.

La vetero, kiel kutime en Hispanujo dumsomere, estis sunbrila kun temperaturo de 25—30 gradoj, sed la varmo ne estis tiel prema, kiel oni estus atendinta.

La programo estis la tradicia: Interkona vespero, solena inaŭguro, ĝeneralaj kunsidoj de U.E.A., kunvenoj de la Komitato kaj de la Akademio, kunsidoj de la fakaj asocioj, Somero Universitato, bankedo, balo, teatraj kaj muzikaj prezentadoj, junulara kaj hispana vesperoj, oratora kaj belartaj konkursoj, kaj nature ekskursoj.

Kompreneble ne estis eble ĉeesti ĉiujn aranĝojn, eĉ ne la oficialajn, sed oni devis elekti inter la diversaj programeroj kaj partopreni en kelkaj el la ĉefaj aranĝoj.

En la Interkona Vespero 3/8 partoprenis proks. 1 000 personoj,

kiuj renovigis malnovajn konatiĝojn.

La Inaŭguro okazis dimanĉon 4/8 je la 9,30-a h. en «Palacio de la Musica» kaj daŭris 3 horojn, sed tre solenajn kaj gravajn horojn, ĉar la inaŭgura ceremonio en mia opinio ĉiam signifas la plej solenan kaj interesan parton de la Esperanto-kongresoj. — Post la malferma parolo de la prezidanto de U.E.A., prof. Ivo Lapenna, okazis salutparolado de oficiala hispana reprezentanto, s-ro Marcelo Fraga Iribarne, ĉefdelegito de la Ministerio de eksteraj Aferoj, kiun respondis s-ro Wensing, vicprez. de U.E.A. Sekvis parolado de prof. Miguel Sancho Isquierdo, prez. de Loka Kongresa Komitato, kiu menciis sian memoron pri la 5-a U.K.en Barcelono 1909! — Nun sekvis salutoj de la reprezentantoj de registaroj. Kelkaj el ili bedaŭrinde ne uzis la internacian lingvon, sed sian propran (aŭ la ang-

lan). En la nomo de la Norvega Registaro salutis s-ino Elna Matland el Sauda, kiu bele parolis esperantlingve.

Post muzika paŭzo okazis la salutoj de reprezentantoj de Landaj Asocioj, kio ankaŭ estis tre interesa afero, precipe kiam temis pri malproksimaj landoj en Afriko kaj fora Oriento. — En nomo de N.E.L. salutis la ĝenerala sekretario, John Berggreen el Oslo, kiu transdonis donacon («vikingan ŝipon») okaze de la 60-jara jubileo de U.E.A. kaj admonis al fortiĝado de U.E.A. flanke de ĉiuj esperantistoj. — Post nova muzika programero sekvis la festparolado de prof. Lapenna, kiu montris al la jubilea jaro de la Homaj Rajtoj (1968) kaj la rolo de Esperanto. Li substrekiis la nunan situacion lingvan en Unuiĝintaj Nacioj, kie la naciaj lingvoj tute ne povas solvi la lingvo-ĥaoson, kiu regas en la ĉefa internacia organizo. Li forte atentigis pri la graveco de U.E.A. por la Esperanto-movado kaj apelaciis al unueca kaj koncentrita lukto tiurilate. Li menciis ankaŭ ke U.E.A. tutcerte apartenas al 100 de la plej gravaj internaciaj asocioj el ĉ. 3000 nun ekzistantaj en la mondo. Lia parolado entenis plurajn interesajn sciigojn pri la Monda Lingvo-problemo, sed la loko ne permesas raporton pli detalan. — Lian paroladon oni honoris per longedaŭra tondra aplaŭdo. (Ĝi estas sonbendigita kaj troviĝas en la Centra Oficejo).

La saman tagon okazis diservoj por katolikoj kaj protestantoj, kaj

dum la posttagmezo okazis la 1-a kunveno de Internacia Somera Universitato kie s-ro Lapenna prelegis pri la temo: «La universala Deklaracio de Homaj Rajtoj» (kiel enkonduko por la diskuto en la 1-a ĝenerala kunsido de U.E.A. 5/8.) Prof. Lapenna donis vastan superrigardon pri la deveno kaj enhavo de tiu deklario kaj pri la postaj Konvencioj, sed li substrekiis la malĝojigan fakton, ke ĝis nun neniu ŝtato ratifis la Konvenciojn!

En la vespero okazis 2-foje la Hispana Vespero en Teatro de Zarzuela. Ĉeestis ĉ. 800 personoj, kiuj entuziasme sekvis la prezentadon de Ĥoro Zaragoza kun proks. 30 gekantistoj prezentantaj aron da diversnaciaj kanzonoj. Sekvis abunda aplaŭdo. —

5/8 okazis la 1-a ĝenerala kunsido de U.E.A. kun partopreno de 250 personoj. Antaŭ la ordinara tagordo oni honoris la prezidanton de U.E.A., Ivo Lapenna, pro lia 30-jara estraraneco. S-ro Erik Carlén kiel vicprez. de U.E.A. en nomo de la Asocio faris belan salutparolon al s-ro Lapenna, dankante lin pro lia granda laboro por la Esperantomovado. — La kunvenon poste salutis 8 reprezentantoj de fakaj organizaĵoj. Sekvis vigla diskuto pri la Homaj Rajtoj kaj diskriminacio ĉiaspeca, sed precipe la lingva diskriminacio.

Dum la vespero okazis Bankedo en «Hotel Plaza» kun 280 partoprenantoj, kaj Oficiala Balo en «Cirkulo de Bellas Artes» kun proks. 1000 ĉeestantoj. Estis agra-

Daŭr p. 99

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

Zorgaj manuskriptoj

Nia nova presejo ne komprenas Esperanton. Bonvolu memori tion, dum vi skribas viajn manuskriptojn. Ĉiuj korektoj devas esti klaraj. Se mi tajpas malĝuste, ne sufiĉas surtajpi la ĝustan leteron, ĉar la kompostisto ne scias, kiun elekti. Zorgu, ke ligstrekoj estu malpli longaj ol haltostrekoj. Zorgu pri ĝusta interspaco inter la vortoj. Ĉiam skribu per maŝino, ĉar la redakcio ne povas tajpi viajn manuskriptojn.

Kaj — senkulpigu la presejon!

LA 53-a UNIVERSALA KONGRESO

Daŭr de p. 98

bla etoso dum ambaŭ aranĝoj, kaj dum la Balo oni dancis ĝis post la 2-a nokte. —

La 6-an de aŭgusto okazis kunvenoj de fakorganizaĵoj kaj la Komitato de U.E.A. krom du kunvenoj de la Internacia Somera Universitato. Dum la kunveno de Skolta Esperantista Ligo (kiun gvidas la estinta skoltestro John Berggreen el Oslo por la 3-a fojo) raportigis pri nova kaj vigla intereso por Esperanto inter la ĉefaj skoltgvidantoj, kaj pri enkonduko de Esperanto en skolttendaroj. Se

Daŭr p. 101

Donacoj al la kontorfondajo

Pli frue	kr. 405,00
R. Dreyer	» 10,00
R. Bugge-Paulsen ..	» 30,00
C. S. B.	» 50,00
A. Refsing	» 180,00
H. Danielsen	» 20,00
	<hr/>
	kr. 695,00

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1969. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas siajn kotizojn frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj rekte al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. La kotizenspezoj ne sufiĉas por eldoni dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norvega Esperantisto en la jaro. Sed kelkaj anoncoj estus bona helpo. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur ĉi tiu paĝo.

U.E.A.-kotizoj 1969. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1969. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6, — poŝtĝirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la Jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1969 estas: Membro-Jarlibro kr. 25,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 50,00. Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 75,00.

54-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Helsinki, Finnlando, 26. Julio—2. Aŭgusto 1969. Aliĝiloj estas riceveblaj de la Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Pri planoj de komuna vojaĝo ni poste informos.

La Oficeja fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj, malavaraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ekŝiĝis laŭ la statuto, sed de kiu tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A.. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3-a jarĉvarono. Okazis unu estrarkunveno, kaj oni dissendis unu cirkuleron al la kluboj. John Berggreen reprezentis N.E.L.n ĉe la U.K. en Madrido, la norvegan registaron reprezentis Elna Matland. Oni aranĝis prelegvojaĝon tra la tuta lando (ĝis Tromsø) por la hindu Abani Halder. La Norvega Radio rifuzis proponon pri rondtabla konferenco pri Esperanto. «Reisetrifikforeningen for Oslo og Omegn» decidis eldoni unu plian turistpropagandan filmon pri Oslo kun komentarioj parolataj en Esperanto. Oni decidis starigi novan migrantan ekspozicion kaj klopodi por mencio de Esperanto kiel elektablemo en la normplano por la 8-a kaj 9-a klasoj de la 9-jara lernejo.

La Liga Estraro.

LA 53-a UNIVERSALA KONGRESO

Daŭr de p. 99

la skoltoj, kiuj ja nombriĝas al milionoj da membroj ĉie en la mondo, vere interesiĝas pri Esperanto, tio povus esti treege utila por Esp. —

En la vespero okazis Oficiala Akcepto fare de la Urbestro de Madrid en la belega ĝardeno de Cecilio Rodriques (parto de urba parko Retiro). Bedaŭrinde oni devas konstati la solan malsukceson dum la kongreso; ne pro la aranĝo mem, kiu estis tre sukcesa, sed pro la fakto, ke oni tute forgesis anonci, ke estis eniro nur por invititoj, nome proks. 300 personoj el 1700 kongresanoj, tiel ke kelkcentoj venis sed ne ricevis permeson eniri la ĝardenon . . . Por la aliaj feliĉaj ĉeestantoj tamen estis granda travivaĵo aŭdi la bonvensaluton al la esperantistoj de la vicurbestro de Madrid, verkisto Jesus Suevos — kiu tre laŭdis la Internacian Lingvon — kaj partopreni en la regalado (ĉampano, vinoj, buterpanetoj kaj kukoj), kaj posta promenado en la belega parko kun abundo da floroj, laĝetoj, skulptaĵoj iluminitaj — kaj lunbrilo!

Je 22-a h. okazis Teatra Prezentado en Teatro de la Zarzuela. Estis prezentitaj 3 teatraĵoj: «Malfacila elekto», «Bela indiferentulo» kaj «Analfabeto». Ludis bonege aktoroj de la Internacia Arta Teatro el Zagreb, kaj prof. Lapenna gratulis ilin per elektitaj vortoj. —

La postan tagon okazis interalie la Oratora Konkurso kun

ĉeesto de proks. 120 personoj, kie partoprenis la norvega blindulo Otto Prytz el Oslo (pri temo: «La fenomeno de la Florinfanoj»). La 1-an premion gajnis Hans-Michael Maitzen el Aŭstrujo (pri temo: «Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj» — art. 1 en la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj).

Posttagmeze prezentigis la rezultoj de la Belartaj Konkursoj en salono Zamenhof en la Kongresejo. Prezidis prof. Waringhien, kaj ĉeestis 150 personoj. La tri 1-aj premioj iris al Italujo, Brazilo kaj Hungarujo.

La 8-a de aŭg. estis dediĉita al ekskursoj, nome 3 diversaj al: Escorial — Valle de los Caidos (4 aŭtobusoj), Avila — Segovia — La Granja (4 aŭtobusoj), Toledo — Aranjuez (5 aŭtobusoj), kun partopreno de entute proks. 520 personoj. La belaj malnovaj vidindaĵoj en ĉiu loko estis granda travivaĵo por la partoprenantoj, kaj donis al ili neforgeseblan memoron pri la beleco de la antikvaj konstruaĵoj hispanaj.

La postan tagon okazis la 2-a ĝenerala kunveno de U.E.A. kun ĉeesto de 250 personoj. Oni pri-traktis la raporton de la Estraro kaj la raportojn de la Fakaj Organizaĵoj, kun posta diskuto pri diversaj punktoj en la raportoj.

La solena fermo de la 53-a Kongreso okazis sabaton la 10-an de aŭg. en la Kongresejo sub prezido de nia prezidanto, prof. Lapenna. La ĝenerala sekretario Günther Becker prezentis raporton pri la ĉefaj laboroj faritaj dum la nuna

kongreso. El tiu raporto mi mencias kelkajn punktojn:

- 1) Pola Radio ekde 15/10 elsendos Esperanton 3-foje ĉiutage po duonhora.
- 2) La Komitato ne akceptis la eksigproponon de prof. Lapenna kiel prez. de U.E.A., sed sukcesis konvinki lin daŭrigi sian oficon. Li tion konsentis, sed nur je certaj kondiĉoj esprimitaj en Fundamentaj Tezoj, kiujn la Komitato unuanime akceptis.
- 3) La U.K. en 1972 okazos en Portland, Usono, sed pri 1970 kaj 1971 oni decidis poste.
- 4) La Estraro kaj Komitato ambaŭ akceptis proponon, ke s-ro Lapenna estu proponita por la premio de U.N. pri la Homaj Rajtoj.
- 5) La Komitato elektis novan Honoran Membron de U.E.A., f-inon M. Vermaas.
- 6) Al la Estraro de U.E.A. estis elektita nova membro, s-ro M. Jaumotte, Belgujo, kun specialtasko: Turismo. Cetere la labortaskoj de la unuopaj estraranoj estis dividitaj almaniere ol antaŭe. —

La prez., prof. Lapenna, tralegis 2 rezoluciojn: 1) Pri la Homaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio, 2) Turismo kaj Esperanto. (Tiujn du rezoluciojn vi trovas en la n-ro 7 de Norvega Esperantisto. Red.) — Poste li dankis al ĉiuj helpantoj dum la kongreso. La prez. de LKK, prof. Isquierdo, transdonis la grandan kongresan flagon al finna f-ino vestita en nacia kostumo, kaj s-ro Narvala en nomo de LKK en

Helsinki alvokis al la 54-a U.K. Prof. Lapenna deklaris la Kongreson fermita per la finvortoj: «Per unueco al pluj sukcesoj». —

Generale mi opinas ke la 53-a Kongreso estis bone organizita kaj mi opinias, ke la partoprenintoj trovis ĝin sukcesplena.

John Berggreen.

Arne Vaagen:

MARĈO-PAŬLO kaj la siropo

Arne Vaagen mortis, 90-jara. Li vekis grandan atenton ĉe sia debuto: Kiu estas tiu matura roman-verkisto? Pasis multaj jaroj ĝis oni fine eksciis, ke li estas S.S. Meidell. Li do estis pli ol 60 jara ĉe sia debuto, sed tamen kreis serion da romanoj, kiuj restos parto de la norvega literaturo.

Okaze de lia morto ni jen prezentas ĉapitron el lia romano «La ondoj de Oldersund» en la traduko de Rudolf Dreyer, kiu cetere havas la permeson de la aŭtoro publikigi la tradukon de la tuta romano en Esperanto.

Kiam Jan klake fermas la libron kaj elrigardas malpezigite inter la ferstangojn de la fenestro, li ekvidas Pål Myren irantan al la marbudo kun du buteloj enmane. Iras malrapida rideto sur la vizaĝo de Jan, li rimarkas, ke la viro iras ne sur la gruzvojo, sed sur la herborando, li certe ekvidis, ke la budopordo staras malfermita kaj — la granda, nekuracebla inklinado de

Myrapål, «la Siporo», estas konata en la tuta kamparo — volas eniri neobservita — se eble. Ĉar kvankam Jan neniam estis troakurata, sed male ofte sin amuzis permesante al «Sirupen» resti sola en la budo tiel longtempe, ke li povis trempi la fingrojn en la perdopelvon sub la ŝtopilo, li tamen estas — eble la nudaj piedoj de Agnes trotetantaj sur la plankoj super li kausis tion — tiel eksterordinare petola tiun belan antaŭtagmezon, ke li emas iomete da amuzo.

Li ŝteliras rapide sur la herbejo malsupren al la boato, glitas per ĝi malrapide, ĝis li alvenas ekster la marpordo apenaŭ ekrigardante internen —. Efektive, Pål jam trempis la tutan dekstran pugnon en la perdopelvon sub la siropobarelo kaj ekkomencis la plej ĝuplanan travivaĵon en la vivo, la sisteman purigan lekadon de la fingroj. Jan povas aŭdi lin heneti pro la ĝuo Kiel vento li estas returne, preterpasas la frontonan muron per tri-kvar rapidaj paŝoj kaj staras en la pordaperturo, antaŭ ol la konfuzita Myrapål purigas sin — la manplato, la montra kaj la longa fingroj estas ankoraŭ plenaj de bona, nelekitita siropo.

Bonan tagon, bonan tagon, Pål, ĉu vi estas promenanta — je rapida ekprenado Jan ekprenis la senpreparan manon de la alia kaj ĝin forte premis.

Tute kviete Børgesen demandas lin diligente pri la edzino hejme, pri rekoltaĵo kaj novkulturado, lekante — ŝajnigante ke li lekas — inter ĉiu demando tute kviete

siajn gluecajn fingrojn, tute kiel se estus kultime trovi bonan amerikan siropon sur la pugnoj de la konatoj, kiujn oni rekontas tie ĉi kaj alie, kaj manprenas por deziri bonan tagon.

La duonmaljuna Myrapål staras kun klinita kapo. Li kuraĝis rigardi momente al «Li mem», estas rimarkinta, ke li ne aspektas kole-re. Tamen li staras tie paralizita, la vortoj ne volas elveni, li respondas nur jes, kaj la resto malfortiĝas je ia mallaŭte elmurmurita nenio. Fakte Pål ne estas malriĉa, estas nur tio, ke kvazaŭ neniam restas kontanta mono por io, la aliaj najbaroj havas kaj kafon kaj bakistan panon. Ankaŭ tabakon, kelkaj eĉ havas guton da brando. Ĉion Myrapål povas senesti, se li — nur de tempo al tempo — ekhavas iomete de la benata siropa gusto, prefere iufoje plengorĝon, plenbuŝon, jes, la tutan buŝon plena de la riĉa, forta, fremda gusto, pli bona ol kafo, pli bona ol biero, egale bona kiel brando. Nenion alian li povas imagi al si ŝteleti, iam li estis la asistanto de la sonorigisto, estis antaŭ longa tempo. Pro la odoranta, malrapide fluanta miela fluidaĵo — tiel la manao de Disinjoro devas esti gustinta al la malsatantoj en la dezerto — li forgesas la ordonojn de la infano-dogmo, forviŝas la akran gravan limon inter la mia kaj la via.

Kaj nun staras li tie, kun kurbigita nuko, humiligita, tiel ke bruldoloras kaj pezas pli ol akraj riproĉaj vortoj. La plezuro foriris de la ĝuo, li staras kun pugnigita

mano, ne povis igi sin forleki la restaĵon.

Jan rigardas lin, rigardas la du botelojn, kiuj staras tiel forlasitaj sur la planko, tute puraj ili estas, Pål tralavis ilin per varma akvo, por kunhavi la restaĵon. La deziro piketi lin nun iomete foriris de Jan, estas certe hazardo, li pensas ke estas mi, al kiu la tuta siropa barelo apartenas, kaj li, kiu ŝtelelas el la perdopelvo.

Li kliniĝas rapide: Vi havas nur du duonbotelojn, mi vidas — iru al la bakisto peti du tutajn, tiam ni interŝanĝos, ĉar mi bezonas paron da duonboteloj — kaj Pål eliras rapide. Kiam li venis ĉirkaŭ la angulo, li lavas la manon, rigardas ĝin malgaje, volas sekigi ĝin sur la herbaro, sed ekhaltas, rigardas rapide malantaŭen —. Poste li lekas, malforte ridetante, la montran kaj la longan fingrojn tute puraj. Antaŭ ol li eniras ĉe la bakisto, li tralavas la pugnon en la kotaĵo da pluva akvo sub la pluvdefluilo, sekigas ĝin sur la herbaro.

Kiam li revenas, Børgesen staras kun du malgrandaj glasetoj da brando el la ŝranko enmane. — Jen, sola siropo estas nesana frumatene, nun ni ambaŭ alĝustigos ĝin, je via sano, li diris serioze, drinkaĵoj kaj dolĉaĵoj bone harmonias. —

Kaj nun ekiru fiŝkapti, li diras iom seke memorige, kiam ili disiras. Pål estas maldiligenta, tio estas la pura vero, kaj la kompato devis havi siajn limojn.

Li staris postrigardante lin, kiam li iris supren laŭ la krado-

pordo kun la du tutaj siropoboteloj. Børgesen diris, ke li ne volas havi kontantan monon, sed kuirfiŝojn por la sabato. La pendanta postaĵo kvazaŭ iomete foriris de Pål, ĉar la tuta kamparo tamen sciis, kion li portas. Sed — ĉu nun estis korfortigaĵo per siropo ĉu per brando — ĉu eble per io alia, tamen la teniĝo de Myrapål rektiĝis — li portis sian dolĉan ŝarĝon tiel, kiel oni portas karan suĉinfanon brake, li havis siajn ŝilingojn savitaj enpoŝe, kaj hejme, tie hejme sidis Malene rigardetante tra la fenestra vitro de la enirejo, atendante kun varmaj terpomokukoj por la venonta, granda diboĉo. Hodiaŭ la benata manao de Disinjoro nepre ne estos ŝparita.

Esperantigita de Rudolf Dreyer.

EDZINIĜO DE «SUNFLORO»

Membro de Sauda Esperanto-klubb, filino de Norman Birkeli la tielnomata «Sunfloro» edziniĝis sabate la 5. de oktobro en Sauda.

Ŝi estas, kiel vi certe scias, denaska esperantistino, kaj tute perfekte ja ankoraŭ parolas nian lingvon.

Sia patro ĝis dato neniam alparolis ŝin en la norvega lingvo, — se li tion farus, li por ŝi estus tute fremda persono. Kiam ŝi lin aŭdas norveglingve paroli al aliaj, ŝi ridas, — ĉar aŭdiĝas strange en ŝiaj oreloj tia parolo de sia patro.

En pli frua tempo s-ro Birkeli ja, kiel vi ankaŭ memoras, havis raporton pri ŝi en la gazeto nia.



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Notajoj

Dum 1967 Norvega Stata fervojo — N.S.B. — havigis 6 unua klasajn sidvagonojn kun ope 39 sidlokojn, 5 novajn restoracivagonojn kaj I elektran lokomotivon. La maksimuma rapideco de la lokomotivo estas 120 km/horo. La maŝino produktas 6900 ĉevalpovojn. La lokomotivo estas la unua en vico de 20 pecoj.

Dum la jarkunveno de Norvega Fervojista Sportista Asocio en Rapham s-ro Per Svane de la sportista sekcio de la Ĉefestraro de N.S.B. reelektiĝis kiel prezidanto.

La personaro de N.S.B. havas sian propran turistorganizaĵon kiu nomiĝas «La Turistorganizaĵo de la Norvegaj Fervojistoj». Kune kun la sveda fratorganizaĵo la norvega organizaĵo projektis por 1968 proksimume 80 vojaĝojn al 20 landoj por siaj membroj.

Kelkaj el la eŭropaj fervojaj kompanioj aplikas ankaŭ Esperanton en siaj horaroj.

La fervojlinio inter Oslo kaj Trondhejmo, tra Dovre, estas

elektrigita inter Oslo kaj Otta kaj inter ĉituij stacioj estas instaligita CTC sistemo. La aŭtobuskompanio kiu trafikas la distancon inter Åndalsnes kaj Ålesund, kaj kiu nomiĝas «NSB Ålesund ruten», instalas radiotelefonojn en siaj aŭtobusoj kaj ankaŭ instalas radiotelefonojn en la kontoroj de la kompanio en Åndalsnes kaj Ålesund. Helpe de la radiotelefonoj la ŝoforoj okaze de lavangoj aŭ elglitegaĵoj povas indiki pri malfruigoj.

Kaŭze de la granda amaso da neĝo kiu ĉitium vintron falis en Romsdalen, la specialkonstruita rotacianta neĝplugilo, nomigita norveglingve «Den roterende», estis aplikata sur la fervojlinio «Raŭmabanen» — inter Dombås kaj Åndalsnes. Ĉitium rotacianta neĝplugilo estis la unuan fojon aplikata sur «Raŭmabanen» dum la vintro 1952.

La oficistoj de N.S.B. havas interkonsenton pri proponordigado kun N.S.B. La ordigo de la proponoj traktiĝas en la Ĉefkunlaborkomitato. Pere de Interkon-

sento pri kunlaborkomitato. Estas disdonitaj monpremioj por 784 proponoj ek de la proponordigado de N.S.B. fondigis en 1947. Dum 1947 N.S.B. rekompencis 24 proponojn por plibonigoj per 16200 kronoj, — kaj 33 oficistoj ricevis premiojn — artobjektojn.

Ek de la komenco de 1968 ankaŭ ekzistas nova ordigo — nomigita «proponoj laŭ antaŭdonitaj taskoj de la Fervojadministracio» kaj koncerne «proponoj laŭ antaŭ - - - -» estas — ĝis nun — enliveritaj 60 proponoj.

Kiamaniere varbi novajn samideanojn?

Pro stranga eraro dum la paĝaranĝo en la pasinta numero de nia gazeto elfalis la konkluda fino de la artikolo de s-ro C. Stop-Bowitz. Vi trovos ĝin ĉisube.

Multaj ricevintoj respondas al tiuj leteroj, kaj multaj el ili aliĝas. Ekeftive minimume 50 % de la rektaj membro de N.E.L. rezultigis el ĉi tiu sistemo, la t. n. «sistema varbado». Kun la leteroj ni ĉiam sendas diversajn aldonaĵojn, ekz. la prezliston de la Eldonejo, la folion «Velkommen til Esperanto-bevegelsen» k.t.p.

Kaj plej interese estas ke tiu metodo ja estas malmultekosta, ĝi tute ne ŝarĝis la propagandan fondaĵon, kvankam ĝi estas unu el niaj plej efikaj propagandaj metodoj.

C. Stop-Bowitz
prez. de N.E.L.

UNESCO - novaĵoj

Kosma vortaro.

La Ŝtata Universitato de Oregon, Usono, preparas vortareton pri kosmonaŭtiko, kun 600 oftaj terminoj. La preparon komisiis NASA (Nacia Aeronautika kaj Kosmonaŭtika Administracio), kiu ankaŭ ilustras kaj eldonos la vortareton. La difinoj estos tiel redaktitaj, ke eĉ infano povos kompreni ilin, kaj la tutan tekston oni prove uzos en ses lernejoj de Oregon antaŭ la fina publikigo.

(Lau UNESCO Features kaj Informa Servo de UEA.)

RECENZOJ

POLITIKO

Todor Jivkov:

Naŭa Kongreso de Bulgara Komunista Partio, raporto kaj ferma parolado.
108 paĝoj, kajero.

Meze dum la ĉeĥoslovaka krizo atingis min tiu raporto de la bulgara komunista partio. Ne estas facile rezenci politikajn pamfletojn, kaj des pli, ĉar oni preskaŭ ne rajtas juĝi laŭ propra politika konvinko. Mi tial decidis lasi la raporton mem paroli, kaj citas:

«La tria fakto — tio estas la sukcesoj de la socialismaj landoj en la kampo de ekstera politiko... Grava fonto de potenco de la monda socialista komuneco, de ĝia supereco super la kapitalista sistemo estas la novtipaj rilatoj inter la

socialistaj landoj — rilatoj de frata amikeco, kunlaborado kaj reciproka helpo, rilatoj saturitaj de spirito de socialisma internaciismo kaj komuna fideleco al la komunistaj ideoj.» (Kursivita alineo paĝo 10.)

«Laŭ nia profunda konvinko, la unuigitaj kaj aktivaj penadoj de la socialistaj landoj, de la laborista kaj naciliberiga movadoj kaj de la demokratiaj fortoj en la mondo povas bridi la fortojn de agreso kaj milito, konservi la pacon kaj sekurecon de la popoloj. (Aplaŭdoj).» (paĝo 18/19).

«Ni sendas batalsalutojn al la komunistaj partioj de la junaj sendependaj statoj, kaj de la landoj, kiuj batalas pro nacia sendependeco — al la fidelaj kaj konsekvencaj batalantoj kontraŭ imperismo kaj koloniismo, por libereco, demokratio kaj sociala progreso. Ni deziras al vi, karaj kamaradoj, pluajn sukcesojn en via patriota kaj kuraĝa agado! (Longaj aplaŭdoj).»

Oni certe povus trovi aliajn citaĵojn. Mi elektis kursivitajn kaj aplaŭditajn.

Haro.

54-a Universala Kongreso de Esperanto

Helsinki, 26. VII.—2. VIII. 1969
Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binne-
neng 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Aliĝkotizoj — Ĝis la 31-a de decembro 1968 validas jenaj kotizoj:

1. Kongresano ne membro individua de UEA 70 gld.
2. Kongresano membro individua de UEA kun Jarlibro (MJ) 60 gld.
3. Kongresano membro individua de UEA kun Jarl. kaj «Esperanto» (MA) 50 gld.
4. Edz(in)o de Kongresano en kat. 1 30 gld.
5. Edz(in)o de Kongresano en kat. 2. aŭ 3. 25 gld.
6. Junulo ĝis 20-jara 21 gld.
7. Universitata studento ĝis 30-jara 35 gld.
8. Blindulo 28 gld.

Unua Oficiala Bulteno kaj Aliĝilo — Kvarpaĝa, grandformata, ilustrita Bulteno estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe la landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj kaj ĉe la kongresaj perantoj. La aliĝilo estas ricevebla ĉe la samaj adresoj.

Infankongreseto — En la kadro de la 54-a U.K. okazos la 11-a Internacia Infana Kongreseto por infanoj aĝaj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj flue parolas la Internacian Lingvon. Aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Glumarko — Bela trikolora glumarko estas aĉetebla ĉe la Libro-Servo de UEA kaj ĉe la Landaj Asocioj. La prezo de dekmarka folio estas 0,50 ned. gld. (2 steloj).

Statistiko — (ĝis 18/9/1968 — Arg. 1, Aŭstral. 2, Aŭstr. 1, Belg. 3, Braz. 2, Brit. 11, Bulg. 10, Ĉeĥ.

2, Danl. 2, Finnl. 18, Franc. 19, Germ. 7, Grek. 1, Hisp. 6, Hung. 5, Isr. 1, Ital. 6, Jap. 3, Jug. 10, Kan. 1, Nederl. 7, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Poll. 4, Port. 2, Sudano 1, Sved. 12, Svis. 4, Turkujo 2, UAR 2, Usono 10. Entute 159 el 31 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

La Esperantoklubo de Bergen.

En nia klubo kunvenoj okazas ĉiun duan ĵaŭdon, iam private en hejmo de membro kaj iam hotela aŭ alia luita ĉambro. Iujn de la kunvenoj ni nomas «laborkunvenoj», kaj ni tiam studas lingvajn taskojn.

Tia kunveno okazis 6/6 en la bela hejmo de Annemor Jæger Bye.

Post malfermo Kjell Offerdal rakontis pri la jarkunveno en Sauda. Li ankaŭ legis skribaĵon kun propono pri esperanto-instruado en radio, sendita de li al N.R.K.

Kristian Sivertsen prezentis sonbendon enluditan en radio, kie Elna kaj Johan Matland kaj Doris Birkelund okaze de la jarkunveno estis intervjuitaj.

Ĉielir-tagon ni kutime aranĝas «Ekskurson Bluen». Ĉijare la

celo estis kampara dometo de Elsa kaj Harald Vernor en Morvik, Åsane.

20/6 en Toms Hotel.

Estis decidite nomi ĝin «Skandinavia kunveno». Ni tial post malfermo kantis la naciajn himnojn de la tri skandinaviaj landoj. Sveda gasto s-ro Lennarr Svensson vizitis nin.

La programon parte prizorgis la studrondo kiun gvidas Doris Birkelund. Ili kaj kelkaj «pli plenaĝaj» anoj laŭlegis historiojn kaj fabelojn, kaj ankaŭ ludis teatraĵeton, «La tri kaproj Bruse». Kjell Offerdal intervjuis la svedan gaston pri la esperantomovado en lia lando.

Klubo Esperantista en Oslo.

Dum klubkunveno 7/3-68 okazis Generala Kunsido, kaj la elektoj rezultis jene:

Prezidanto: John Berggren (reel.)
Vic. » Thor Magnus Carlsen (reel.).
Sekr.koresp.: Kirsten Ek (nova).
Sekr. rap.: Harda Danielsen (reel.).
Kasisto: Aslaug Refsing (nova).
Studgvidanto: John Berggren (reel.).
Propagandestro: T. M. Carlsen (reel.).
Estraranoj: Brynhild Østmo kaj Aase Gustavsen (reel.).
Anstataŭantoj: Eva Støp-Bowitz (nova) kaj Birgit Normann (reel.).

Raportis Harda Danielsen.

Ekskurso al Tyrifjorden

10/7-68.

Merkredon la 10-an de julio 22 membroj krom 5 gastoj kolektiĝis — alvenintaj per aŭtoj aŭ

aŭtobuso — en la bela somera domo de s-ino Else Bugge-Paulsen ĉe la lago Tyrifjorden.

Carl Støp-Bowitz faris memorparolodon okaze de la morto de s-ino Aagot Sletterød, kiu estis inter la fondintoj de nia klubo antaŭ 52 jaroj kaj ĉiam poste restis fidela membro. Nun ŝi estis honora membro de nia klubo. —

Post la manĝado oni vigle babilis esperantlingve kaj regis tre agrabla etoso.

Dum la hejmenveturado oni ankaŭ povis ĝui la sunsubiradon en la bela vetero. Do sukcesa ekskurso!

Reportis John Berggren.

Sauda Esperantoklubb

kunvenis 29/3 en la hejmo de s-ino Veka. La prez. Johan Matland bonvenigis, kaj donis la vorton al la vicprez. Olav Andersen kiu parolis pri la temo «La arto de fotografado». Olav Andersen ĵus gajnis la unuan premion en la fotokonkurso de «Den norske turistforening», kaj havas tre eminentan konon pri la fotografa arto.

Jarkunveno de MARA VENTO okazis en KFUK 29/2. Bonvenigis la prez. kaj post malferma kanto sekvis jar-raporto kaj jarbilanco kiuj ambaŭ aprobiĝis. La raporto rakontis pri relative aktiva jaro kun regula kunvenado, studlaboro ktp. Estis dum la laborjaro pluraj vojaĝprogramoj kun filmoj kaj kolor-lumbildoj. Du ge-

klubanoj bonrezulte trapasis elementan ekzamenon, aliaj studas por la supera.

Nombro da geklubanoj partoprenis la landan kunvenon en Sauda pentekoste kaj la klubo havis reprezentantojn ankaŭ en la Universala Esp. kongreso en Roterdamo pasint-somere. Kiel en antaŭaj jaroj, MARA VENTO estis en kontakto kun Esperantoklubo kaj radio-stacioj en pluraj landoj.

Kiel prez. kaj vizprez. reelektiĝis respektive Johannes Sortland kaj Klara Dahl. Nova kasisto fariĝis Steffen Kjetland. Kiel sekretario reelektiĝis O. J. Rønnevig kaj kiel estrarano O. Thormodsens. Anstataŭantoj: Solveig Mathiesen kaj Signe Lise Stava. Revizoroj: Erling Vorland kaj Sigmund Blikshavn. Studgvidantino: Judith Johansen. Raportisto al «Esperantobladet» la sekretario. Komisiulo de Esp. Forlaget Steffen Kjetland. Propogand- og informkomitato: Sigv. S. Ege, Arne Gram kaj A. J. Smedsvik. Gazetara- kaj radio-representanto: O. Thormodsens. Bibliotekisto: Sverre Loge Pettersen.

O. Thormodsens.

*Mara Vento, Haugesund
kunvenis 28/3.*

Ni komencis kantante vigligan kanton kaj poste enmarŝis en la saloneton viro kun araba kapvesto kaj salutante per la konata saluto en Izraelo «salaam». Estis la programulo de la vespero, s-ro Hartvig L e k n e s.

Li prezentis tre interesan programon pri popoloj kaj cirkonstancoj en la hodiaŭa izraela ŝtato. Per trafaj kaj plaĉ-koloraj bildoj li konigis al la ĉeestantoj multajn trajtojn de la biblia lando montrante kiel vivas kaj diligente laboras la izraelanoj kaj menciante ankaŭ la problemojn kiujn ili devas fronti (la streĉan situacion inter judoj kaj araboj ktp) Aldone li prezentis ankaŭ nombron da belaj kolor-bildoj montrantaj partojn de Haugesund kaj ĉirkaŭejoj. La programulo estis dankata per tutkora aplaŭdo.

Pli poste ni denove kantis, vigle interbabilis, kaj aĉetis Esp. ajn librojn ĉe la kluba komisiulo.

25/4. La kunvenon malfermis la prezidanto kaj ni komencis kantante vigligan kanton. Sekvis referaĵo pri la antaŭa kunveno.

La programulo ĉi-foje estis s-ro Hendry Hermansen kun sia edzino kiel lerta asistantino. Ili prezentis riĉan kaj varian kolekton da belaj kolor-lumbildoj, kun aldonaj informaj komentarioj, pri urboj, lokoj kaj pejzaĝoj en Usono. En la bild-programo estis ankaŭ interesaj fragmentoj el la vivo de norvegoj kiuj trovis sian hejmon en la granda lando transmara.

Estis programo tre ŝatata, kaj per forta kaj meritita aplaŭdo la ĉeestantoj dankis al la prezentintoj.

Cetere ni trinkis kafon kaj vigle interbabilis.

Ref.: O. Thormodsen.

La tri verdaj Steloj, Løten.

30/7. Okaze de vizito de gesinjoroj Frantiska kaj Vaclav Ruzička de Ĉeĥoslovakujo la klubo aranĝis kunvenon en la bieno Tomter, la hejmo de s-ro Eli Immerslund. Al la kunveno estis invititaj la membroj de LA NORDA STELO, Hamar.

Starante sur la korto de la bieno inter la malnovaj, ĉarmaj domoj sub graciaj betuloj, s-ro Krogstie deziris bonvenon kaj salutis la eksterlandajn gastojn per transdonado de floroj al la sinjorino kaj norvega standardo al la sinjoro.

S-ro Ruzička montris lumbildojn de Prago. Ni ege admiris la multajn fantazie belajn konstruaĵojn kies historion la parolanto detale kaj interese rakontis. S-ro Krogstie lerte tradukis.

La mastrino de la domo regalis per bonodora kafo kaj kukoj. La vespero rapide pasis, oni babilis kaj ĝuis la kuneston. S-ro Ruzička dankis pro ĉio kion la Løtenanoj faris por li kaj lia edzino, kaj fine li bele kantis kelkajn dolĉajn popolkantojn de sia lando.

Lise Koller.

Esperanto en la Montaro.

La studenta ekskursista societo «Gangaren» en Bergen havis pasokrestadon sur Hardangervidda kun 26 partoprenantoj, parte el malproksimaj landoj kiel Koreo, Israelo kaj Usono. Entute kvar konis esperanton, kiu inter lingvoj endis la trian rolon post la norvega kaj angla. Ni klopodas

pligrandigi la kapaciton en la estonteco kaj esperas, ke jaron post jaro esperanto fortigos sian pozicion.

A. K.

Okcidenta distrikto de N.E.L.

kunvenis pentekoste en Hoganvik, Ryfylke. Proks. 40 gesamideanoj ĉeestis kaj ĝuis la kunestadon en la ĉarma loko, en bela suna vetero.

La aranĝon gvidis la prezidanto de la distrikto Johan Matland.

Sabatvespere oni interkonatiĝis en ĉarma atmosfero, kaj reprezentantoj de la kluboj salutis: El Bergen Åshild Birkenes, el Haugesund Johannes Sortland, el Odda Trygve Reisæter kaj el Sauda Olav Andersen.

La jarkunveno okazis dimanĉe matene, ekstere en la bela ĝardeno. La jarraporto montris ke kelkaj kluboj bone agadas, dum kelkaj restas pasivaj, kaj unu (la klubo Stavanger) ekŝiĝis. Du eksterlandaj prelegistoj vizitis la distrikton en la pasintaj du jaroj, nome s-ro Aŝvinikumar el Hindujo kaj s-ro Even Itamar Zohar el Israelo. La prezidanto de la distrikto vizitis 2 klubojn farante prelegon pri la kongreso en Budapeŝto, kaj la sekretario faris prelegon en Sand por lernantoj de la mez-grada lernejo tie. La distrikta estraro dissendis ekzemplerojn de la leĝoj al la kluboj, kaj cirkulerojn.

La raporto estis aprobita, same la kalkulaĵo. La prezidanto pre-

zentis rezolucion al Norsk Rikskringkasting, kiu postulas instruadon en Esperanto en la radio kaj en la televido egalrajte kun aliaj lingvoj. Oni unuanime aprobis la rezolucion.

Krome ni diskutis la laborplanon de s-ro Berggren (N.E.L.) kaj faris komentariojn al ĝi.

La tagon antaŭ pentekosto estis sendita parolado de Elna Matland per Stavanger Lokal pri Esperanto, sub la titolo: «Hvorfor ikke et internasjonalt hjelpespråk?» (frimodig ytring). Kaj la pentekostan tagon la ĉefo de N.R.K. Stavanger S-ro Ivar Holm vizitis la kunvenon kaj faris intervjuon kun kelkaj esperantistoj, i.a. la malnova kaj la nova prezidantoj. En la intervjuo s-ro Matland ankaŭ legis la rezolucion kiun ni ensendis al Norsk Rikskringkasting.

La estraro de la distrikto ŝanĝas ĉiun duan jaron, kaj ĉijare la vico estis al Haugesund. La nova estraro estas la jena: prez. Steffen Kjetland, vicprez. Klara Dahl, sekr. Olav Thormodsen, kas. Ole J. Rønnevig, ano Johs. Sortland, anstataŭantoj Solveig Mathiesen kaj Signe Lise Stava. Rev. Erling Vorland kaj Sigmund Blikshavn.

La gazetoj en Okcidenta Norvegujo volonte akceptis la referaĵojn de la kunveno, kaj la «trian» pentekostan tagon kaj Stavanger kaj Bergen Lokal sendis la intervjuon faritan de s-ro Holm.

Elna Matland.

Korespondu!

30 jara hungara ĵurnalisto Cseri Sándor, Epreserdö u. 34. Budapest IX. *Hungarujo.*

S-n Mirko Zlatkoviĉ, Maršala Tita 17, *Lapovo*, Jugoslavio, 27-jara elektristo, dez. kor. pri filmo, sporto, vojaĝado, popolaj kutimoj. Kolektas bildkartojn, gramofondiskojn.

22-jara studento, dez. kor. Interesoj: litetratur, fremdaj lingvoj, muziko, vojaĝoj.

S-ro Jan Bystronski, *Lodz 56*, Lumumby 3/5, *Pollando.*
Lodz 56, Lumumby 3/5, *Pollando.*

Nikola Dimitrov Gjurnev
/ 25 jara — fraŭlo /

Atamaska Dimitrova Gjurneva
/ 21 jara — fraŭlino /

Georgi Dimitrov Gjurnev
/ 16 jara — lernanto /

v. Baldero, dis: Blagoergradski, *Bulgario* — deziras korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj; interesiĝas pri: aŭtoj, sporto, gramfondiskoj, modo, medicino, moderna muziko, magnetofonoj, tranzistoroj, fotoj, filmoj, teatro, turismo, P. K. kaj P. U.

32-jara hungara komencanto tre ŝatus korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Mi estas instruisto pri lingvoj kaj literaturo kaj interesiĝas pri arto kaj konstruaĵoj. Ludoviko Bagics, Vihar u. 2/a, *B u d a p e s t* III. ker., *Hungarujo.*

Deziras korespondi kun novaj landanoj muzikinstruistino Nina Klodas, *Orla 40*, *P a b i a n i c e*, *Polujo.*

Mi tre deziras interŝanĝi kun vi ilustritajn poŝtkartojn, fotojn, ilustritajn gazetojn kaj aliajn, precipe ilustritajn materialojn. Mi estas plantamatoro, ekspedagogo kaj eksagronomo pri ĝarden-kaj legom-plantoj, mi ankaŭ tre ŝatas enĉambrajn plantojn. Precipe interesas ilustrita materialo pri plantoj, homoj, humoro. Gorazeev Vladimir, Opitnij učastok. Abonem. jaŝĉik 25, *M a g a d a n*, *Sovet-Unio.*



NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —

Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj. — Telefono: 54 727